

ELDONANTOJ:
D-ro L. Zamenhof, Warszawa (Varsovio).
W. M. Page, adv., Edinburgh.
E. Archdeacon, gen. sekr. de Tour.Club de France, Paris.
Teo Jung, Köln (Kolonjo).
G. van Heek, Hengelo.
Frans Schoofs, Antwerpen.
P. v. Medem, bankdirektoro, Kaunas (Kovno).
Ĉef-redaktoro: Teo Jung.
Kun-redaktoro: M. Buijn.
Literatura redaktoro: Zanoni.

ESPERANTO

★ TRIUMFONTO ★

ADMINISTREJO:
Köln-Horrem, Rejnlando, Germanio.
Germ. poŝteka konto 70865, por Teo Jung, Köln-Horrem.
Manuskriptojn oni skribu sur unu flanko de l' papero. Skribu ĉion legeble, se eble per maŝino. Por resendo aŭ respondo aldonu resp.-kup. aŭ poŝim. Adresu ĉion al s-o Teo Jung, Köln-Horrem, Germanio.

ABONEJOJ

ekzistas en multaj landoj. Vidu la liston de la Abonejoj sur la anonca paĝo. — En multaj lokoj ET estas poekzemple aĉetebla ĉe stacidomoj kaj aliaj publikaj gazet- kaj libro-vendejoj kaj en grupoj. Dum vojaĝo oni postulu ET en ĉiuj stacidomaj gazet-vendejoj, hoteloj, kafejoj kaj restoracioj.
Komercaj ĉambroj favoraj al Esperanto abonas ET senpage ĉe la administrejo per oficiala letero. — Bibliotekoj, legejoj, redakcioj, aŭtoritatuloj (ne-esperantistaj), povas ricevi ET pro propagandaj celoj por la duono de la abonprezo.

JARABONO:

3 dolaroj, 6 guldenoj, 10 svedaj kronoj, 12 svisaj frankoj, 12 danaj aŭ norvegaj kronoj, 12 pesetoj, 20 francaj aŭ belgaj frankoj, 30 liroj, 60 finnaj markoj, 70 ĉsl. kronoj, 250 hung. kronoj, 600 aŭstr. kronoj, 1600 pol. markoj. — Ĉiu pagas en la valuto de sia propra lando per naciaj bankbiletoj en rekomendita letero, aŭ per germanaj bankbiletoj aŭ ĉekoj sur germanaj bankoj laŭ la taga kurzo. — Balkanaj kaj baltaĵ staraj pagu 60 germ. mk., Rusio 12 000 rubl. Aliaj landoj pagu per dolaroj aŭ ŝilingoj, kiuj estas aĉeteblaj ĉe ĉiu banko kaj monŝanĝejo. — Ne estas necese pagi tutan jarabonon je unu fojo. Oni sendu laŭvole altan sumon, kaj ni liveros tiom da numeroj, por kiom valoras la pago. Abonantoj, kies abono estas finiĝonta, ricevas ĝustatempe admonilon. — Abonoj povas esti komencataj per la sin numero. — Germanoj abonu ĉe la poŝto (Postzeitungsliste, 13. Nachtrag, Ergänzungsheft 3. paĝo 280, sub „Kunstsprachen“), kvaronlare 18 mk., aŭ rekte ĉe la administrejo Köln Horrem, Germanio, (ĉiu numero banderolita 1,25 mk.).

ANONCOJ

kostas po cm² (kvadracentimetro) 1,50 germ. mk.; ĉe grandaj aŭ ripetataj anoncoj rabato ĝis 50% (por abonantoj kaj esp. firmoj kromrabato de 20%). ANONCETOJ kostas por 1-2 foja enpresoj kaj 25 vortoj dekonon de la jarabono aŭ 6 respond-kuponojn; por 3-5 foja enpresoj ni kalkulas la duoblon. Ĉe rektaj abonantoj ni deprenas la pagon por anoncoj de la abonkonto (5 resp. 10 n-oj). — Familiaj anoncetoj (naskiĝo, fianĉiĝo ktp.) kaj anoncetoj pri gravaj esp. okazintoj (ĉelkunsido, fondiĝfesto ktp.) estas unufoje enpresataj senpage. En korespondaj anoncetoj ni forstrekas ne-necesajn kaj naivajn.

Numero 59. Edinburg, Paris, Köln, Hengelo, Antwerpen, Warszawa, Kaunas, 20. Nov. Jaro 1921.


La Voko

La Dekkvara — nia plej norda Kongreso.

La XIV-a Universala Kongreso de Esperanto, okazonta en venonta jaro en Helsinko, ĉefurbo de Finnlando, estas la plej norda el niaj internaciaj kongresoj. Ĉar oni ankoraŭ ne baldaŭ povas atendi kongresan inviton el Novaja Zemlja aŭ Spitzbergen, oni devas supozi ke ankaŭ la estontaj kongresoj verŝajne longe ne forprenos de ĝi tiun ĉi rekordon.

Eble luj samideanoj ĉe tiuj ĉi vortoj jam sentas malvarmon en la aĉro kaj komencas ŝanceliĝi, ĉu oni vojaĝu al tia kongreso — nu, ili estas iomete tro timemaj. Okazis, vere, ke la hispana samideano en sia gazeto klarigis al samlandanoj ke Finnlando kuŝas „norde de la Skandinava duoninsulo“, sed li verŝajne rigardis al la karto de malĝusta flanko. Efektive, Helsinko estas same proksima al la Norda Poluso, kiel al Saharo — do la aventuremuloj, kiuj pensis pri unutaĝa ekskurso al la unua, povos la sekvantan tagon veturi al la dua, se ili volas — sed sen la helpo de la LKK, kiu timante la sorton de siaj kolegoj en Praha, ĝis nun atakataj de riproĉemuloj, decidis moderigi siajn ekskursajn ambiciojn.

Sed la personoj, kiuj dum la eŭrope varmaj aŭgustaj tagoj volos ĝui la trankvilan ĉarmon de la norda naturo, havos plenan eblecon fari tion, partoprenante en la aranĝotaj postkongresaj rondvojaĝoj tra Finnlando. Ili ne pentos: ili vidos eble iom sovaĝan kaj severan, sed belan kaj plenan de poezio naturon, pensigantan pri malnovaj popolaj legendoj: ili aŭdos la bruon de akvofaloj, veturos tra pentrinaj insularoj, supreniros muskajn rokojn, de kie ili ĝuos la vidaĵojn de ondanta pinarbarego kun spegulaj lagaroj. Sed ankaŭ kun la popolo kaj ĝiaj moroj, ĝia historio kaj nuntempa vivo, ĝia arto kaj kulturo, ili povos facile konatiĝi, ĉiu laŭ siaj intereso. Do la kongreso estos bona okazo por interesa vojaĝo en nova lando, ĝis nun malmulte konata



La Rapidajoj.

ĝiganta, abunde kaj pentrinde interrompata per spegulaj lagoj; ĝi estas nigreverda apude kaj ĉiam pli kaj pli bluiĝanta malproksimen, ĝis ĝi kunfandiĝas kun la palblua ĉielo. Precipe bela estas la vidaĵo, kiam la monto, kie vi staras, troviĝas sur bordo de pli granda lago. Tiam vi ankaŭ vidas proksime ĉe viaj piedoj ĉarmajn, allogajn insulojn, je kiuj sopiras via koro; vi sentas kvazaŭ nova, neesplorita mondo estas malfermata antaŭ vi; sen zorgoj, ne malhelpata, ĉirkaŭita de virga, majesta naturo, vi povas dum horoj fordoni vin al revoj, al kvietaj meditacoj. — Malsupreniru de la roka montsupro kaj prenu lokon en boato, kiu veturigos vin tra la labirinto de la lagaj insuloj. La akvo antaŭ vi estas pura, helblua, la proksima bordo — griza rokego kovrita per likenoj, kun maldensaj piceoj sur la deklivo — abrupte falas en la profundon; sur alflankokuaŝas arboplena or-verda insuleto, post ĝi alia pli malluma, poste tria, kvara, ĉiam pli kaj pli multaj, unuj preskaŭ nigraj, aliaj kvazaŭ oraj, la plej malproksimaj estas nur bluj mirajoj en la pala malproksimo. La boato mallauĝe glitas inter ili, novaj kaj novaj aperas, tuta panoramo de insuloj de plej diversaj formoj kaj aspektoj. Oni sentas sin kvazaŭ en ensorĉita fabela mondo, malproksime de la nuntempa civilizacio, profunde en la epoko de Kalevala.

Vi alboridiĝas kaj eniras en la ombran, pinodoran arbaron. La rektaj trunkoj de la pinoj dense staras ĉirkaŭ vi, barante la vidaĵon, logante al senfina vagado en serĉado de kaŝitaj belajoj. Vi vagas inter muskaj ŝtonegoj, supreniras kaj malsupreniras ondantajn altajetojn, kaj fine trovas vin sur arbora vojo iranta laŭ mallarĝa montdorso. Longe kuras la volo, la montdorso mallarĝiĝas, la arbora iom maldensigigas, kaj subite lo ekbrilas inter la trunkoj: ambaŭflanke estas lagoj, kaj vi troviĝas sur mallarĝa landkolo. Sur unu flanko la lago estas vasta kaj senfina, blua kiel maro, kun nur malmultaj insuloj en la malproksimo; sur alia la spegula surfaco reflektas la kontraŭan bordon, similan landkolan kun vico da graciaj pinoj. La pinoj estas ĉie, iliaj kuprekoloraj trunkoj kaj la blueverdaj kronoj liveras belan kadron al ĉiu vidaĵo.

Oni ne bezonas multan tempon por konatiĝi kun la diversaj tipoj de la finlandaj vidaĵoj. Tial ĉiu kongresano povos vidi almenaŭ ion karakterizan por la lando, eĉ se li ne tro malproksime forveturos el Helsinko. Se vi oferos unu tagon por mara vojaĝo al Turku (Åbo), vi vidos sufiĉe da belajoj de la insularo, kies bildoj por ĉiam restos en via memoro, kaj ankaŭ konatiĝos kun la antaŭa malnova ĉefurbo de la lando. Ankaŭ Hangö, konata marbanloko, estas facile vizitebla. Ne pli da tempo estas necese por vojaĝi al Tampere (Tammerfors) — industria centro de Finnlando —, proksime de kiu troviĝas plej ĉarma lagara regiono de Rangasala, kies belajoj inspiris la poetojn Runeberg kaj Topelius. Aŭ oni povas el Helsinko veturi per fervojo al urbeto Lahti, de tie per vaporŝipo tra la bela lagaro de Päijänne al la banloko Heinola, de tie per boatoj al la rapidajoj de

de l' Nordo.

Venu al Finnlando, la lando de mil lagoj!

Maukala kaj poste parte per boato, parte piede al la fervojo kaj ree al Helsinko. Por tio estas necesaj du tagoj.

Sed kiu havas iom pli da tempo, tiu vojaĝu al la orienta Finnlando, al Savo kaj Karelio, kie la naturo estas pli virga kaj pli sovaĝa. Tie troviĝas la fama monto Koli kun sia majesta kaj belega panoramo al la lago Pielisjärvi. Sur la bordo de la granda lago Ladoga kun eble ankoraŭ pli bela insularo ol ĉe la marbordo kuŝas la urbeto Sortavala; de Sortavala oni povas veturi al la insulgrupo Valamo, kies naturo estas aparte pentrinde kaj kie troviĝas interesa rusa monaĥejo. Poste estas la fama landkolo Punkaharju, ŝatata restadejo de turistoj. De tie estas proksima la vojo tra la lagaro Saimaa al la urbeto kaj banloko Savonlinna (Nyslott) kun la konata malnova kastelo de S-ta Olao. El Savonlinna vaporŝipo portas vin tra la plej belaj regionoj de la lagaro Saimaa al Vuoksenniska, por ke vi povu admirii ankaŭ la plej faman vidaĵon de Finnlando, la akvofalon Imatra. Poste vi povas forlasi la lagaron per vaporŝipo kaj veturi tra la Saimaa-kanalo kun ĝiaj multaj kluzoj al Viipuri (Viborg), grava komerca urbo, i. a. kun interesa malnova kastelo.

Sed se vi el Savonlinna veturos per vaporŝipo norden, vi ankaŭ ne pentos: la bela lagara vojo alkondukos vin al Kuopio, plej grava urbo de meza Finnlando. Apud ĝi, de la turo staranta sur la monto Puijo, vi vidos la plej vastan panoramon de la finlanda arbaro kun la multaj lagoj. El Kuopio oni vojaĝu per la scenriĉa fervojo al la ankoraŭ pli norda urbeto Kajaani kun ĝiaj belaj akvofaloj. Kajaani estas plej bona loko por sportaj fiŝkaptistoj. De tie vi povas, se vi deziras, fari la neforgeseblan vojaĝon en boato tra la rapidajoj de la rivero Oulujoki al la urbo Oulu (Ulleåborg), kie vi ree estas en civilizita mondo.

Tiuj vojaĝoj postulas unu ĝis du semajnojn, laŭ elektitaj vojaĝlinioj. Sed dum ili vi preskaŭ vidos la tutan Finnlandon, kaj la ricevitaĵ impresoj longe restos en via memoro kiel rebulo de la ĉarma kaj virga naturo de tiu maldense loĝata, ankoraŭ malmulte konata lando. Venu do al la plej norda kongreso kaj konvinkiĝu, kiel bela povas esti la nordo. G. C.

Por propagandi

ni presas de la hodiaŭa kaj de la venonta numeroj de ET po 3600 ekzempleroj.

Kiel felietonan redaktoron


ni sukcesis gajni la konatan esperantan stiliston Zanoni. La kunlaborado de tiu eminenta samideano garantios modelan, severe elektitan kaj tial ĉiam valoran enhavon de la „substreka“ parto de ET. Li komencos sian redaktadon post finiĝo de „La Senlingvulo“.



La Lago.

al la internacia turistaro, sed alloga kaj vizitinda. Ke la turistoj ĝis nun ne tiel multe vojaĝis al Finnlando, kiel al kelkaj aliaj landoj, dependis ĉefe de la malfacila pasporta sistemo dum la rusa tempo, sed multaj eble ankaŭ opiniis ke Finnlando kuŝas iom flanke de la kutimaj vojoj, ke estos malfacile tien alveni. Nu, tio jam de longe ne estas plu ĝusta — oni nun havas bonajn komunikadojn kun okcidenta kaj meza Eŭropo per komfortaj vaporŝipoj el Stockholm, Stettin, Lübeck, Kopenhago, Antwerpen, Hull kaj aliaj lokoj. La vojaĝado en la lando mem estas ankaŭ tre facila: ĉu per la ordigitaj fervojoj, ĉu per la multaj mallarĝaj, sed oportunaj ŝipoj laŭ la marbordo aŭ sur la internaj lagaroj. Tiel oni al ĉiuj estontaj kongresanoj devas konsili, ke ili rezervu al si almenaŭ iom da tempo post la kongreso por malgranda rondvojaĝo, kiu donos al ili multajn agrablajn impresojn.

Finnlando ja estas konata en la mondo kiel la „Lando de mil lagoj“ — pli vere ĝi posedas eĉ multajn milojn da lagoj — kaj efektive la interna lagara pejzaĝo estas io tre tipa, io specife finlande. Se vi staras sur alta monteto aŭ sur unu el la kelkloke starigitaj vidaĵuroj, antaŭ vi etendiĝas senfina arborego, jen leviganta, jen malalt-



Pejzaĝo el Norda Finnlando.

Esperanto kaj Tut-Pacifika Unio.

(Forsendita el Vladivostok la 25. aŭgusto de S. Averkjev, prez. de „Espero“ kaj vicdel. de UEA. Majlongigita.)

Dum julio 1921 en Vladivostok (Orienta Siberio) estas fondita siberia apartaĵo de Tut-Pacifika Unio (The Pan Pacific Union), kies centra komitato kaj oficejo havas sidejon sur insulo Honolulu. Tiu ĉi apartaĵo celas ĉefe starigi interkonsenton inter la nacioj, kiuj havas siajn teritoriojn ĉe Pacifika Oceano, por plej bona reciproka interkonsento de tiuj nacioj kaj efektiva de la celoj starigitaj de la Unio por la bono de la ĉepacifikaj popoloj.

Sed je la unuaj paŝoj de sia agado la komitato de l' apartaĵo renkontis grandegan malhelpaĵon, ne havante difinitan, taŭgan, neŭtralan rimedon por interrilati kun ĉepacifikaj popoloj. Diskutante ĉi tiun demandon, la komitato, konsistanta plejparte el profesoroj de la Regna Universitato de Vladivostok, ekatentis Esperanton kaj okazigis la 2. aŭg. en la salono de la Universitato sub prezido de prof. Grebensĉikov, konferencon kun la esp. societo „Espero“.

La 5. aŭg. en ĝenerala kunsido de „Espero“ estas aprobita jena rezolucio: „Ekaŭdinte la proponon de l' komitato de la Siberia Apartaĵo de la Tut-Pacifika Unio pri aliĝo de la societo „Espero“ al la Apartaĵo kun la rajtoj de jura persono, por kunlaborado enkonduki la lingvon Esperanto kiel oficialan por la korespondado kaj interkomunikiĝo de la Unio, se sekvas konsento de ĉiuj apartaĵoj de la Unio, sed ĝis tiam kiel lingvon de l' siberia apartaĵo, la ĝen. kunsido decidis: aliĝi al la siberia apartaĵo de la Unio kun la rajtoj de jura persono kaj sciiĝi la komitaton de suprenomita apartaĵo pri tio ĉi kun la peto havi reprezentanton de la societo „Espero“ en la komitataj kunsidoj de l' apartaĵo.“

Tiu ĉi rezolucio estis sendata al la komitato de l' apartaĵo. Espereble baldaŭ denove okazos konsilio kun la komitatoj de la Unio por ellabori detalan planon de la estonta kunlaborado.

El Pola lando.

Ni ankoraŭ ne tute komprenas la momentan situacion de nia afero en Pola lando. Tiel „Pola Esp. Societo“ kiel „Laboro“ kaj „Konkordo“ en Warszawa sendis al ni rezoluciojn; krome ni ricevis ĝustigojn, protestojn, konsilojn kaj dezirojn el diversaj urboj de Pola lando, laŭ kiuj ni devas supozi, ke la polaj esperantistoj mem ne tute komprenas la situacion. Tamen ŝajnas al ni — ĉe objektiva observado —, ke okazis erar-kompreno, ke la intencoj de Pola Esp. Societo estas bonaj sed iom vualitaj.

Intertempe la samideanoj de Bydgoszcz jam fondis provizore la „Esp. Asocion de Polujo“. Kaj, ĉar ili deklaris, ke ili nur provizore alprenis la estrecon kaj ke poste ĉiuj aliĝintaj grupoj elektos la estraron, ni konkludas, ke por la pola esp. movado estus plej bone provizore subteni ĝenerale la agadon de la Bydgoszczanoj.

Tial, por eviti ĉian nenecesan malpacon, por ne estiĝi novajn erarkomprenojn kaj precipe ankaŭ pro la manko de loko en nia ĵurnalo, ni decidigis ne publikigi la diversajn ricevintajn rezoluciojn, protestojn, leterojn ktp. Vivu la konkordo, ĝi estas plej certa garantio por nia venko!

Komerc.

La foiroficejo de Frankfurt a. M. ekspedas en la sekvontaj tagoj la aliĝilojn por partoprenado en la venonta printempa foiro (2.—8. aprilo 1922). Limtempo por aliĝoj estas la 1. dec. 1921.

La fondiĝo de Tallinn.

(Estona popola legendo.)

La unua legenda reĝo de estona popolo estis Kalev. Li intencis foje fondi urbon, sed la bruo, kaŭzita de lia ŝtonjetado, kolerigis la diablon, kiu proponis al Kalev vetjeti ŝtonojn kun li. Kalev gajnis la veton, sed faletis kaj tiel forte vundis sian kapon, ke li mortis post mallongedaŭra malsano. Post lia morto lia edzino Linda starigis por li monumenton, kiu nun formas la centron de Tallinn (= Reval) kaj nomiĝas „Alturbo“ aŭ „Toompea“.

Per larmoj Linda lavis la kadavron de sia kara edzo, vestis lin per silka ĉemizo kaj zonis lin per ora zono, metis sub lin nebulsimilajn litotukojn, kovris lin per delikataj vualoj. Ŝi ne volis, ke aliaj fosu la tombon. Kalev estis konstruita ĉambon por Linda, Linda volis nun konstrui ĉambon por Kalev, volis mem fosi tombon por li. Ŝi komencis fosi la tombon sur sama loko, kie Kalev estus fondonta urbon, se la diablo ne estus forvokitinta lin de la konstrua laboro. Ŝi fosis la tombon profunda je dek klaftoj. Tiam ŝi entombigis la malvarman korpon de la amata edzo. Sub la kapon ŝi metis orĉapelon, sub la flankon — orveston, al la piedoj — orponardon, vestis la piedojn per orŝuoj. Oni parolas eĉ, ke Linda enterigis la tutan oron de Kalev apud li.

Linda ekmeditis, kiel starigi sur la tombon belan monumenton por la kara edzo. Ŝi pensis: se mi plantos florojn, aŭtuno deŝiros la florojn; se mi kovros ĝin per herboj, brutaro dispremos la herbojn; se mi plantos arbojn, hakilo dehakos la arbojn. Plej bone estos, se mi memoraje aperigos monton sur la tombo.

La Poemo, al kiu estas alluĝita la Natura Floro

de la VIII-aj Internaciaj Floraj Ludoj en Girona (Hispanio) (16. oktobro 1921)

Fraŭlino Teresa Bartino Marull

la ĉarma „reĝino“ de la Floraj Ludoj.

Al Rozo

Via nom' estas Rozo;
kiel prave
tiam nomon vi rajtas,
knabino' bela!
Kiel rozo — de l' floroj
vi samrave,
pro via ĉarmo hela,
de l' belulinoj estas
reĝin' glora;
kiel rozflor' — belega,
bonodora...

Se mi estus de rozo
perla guto,
je nokto de somero,
kvazaŭ deca al vi ĉiel-
tributo,
jen mi, sur vin falinte el
aero,
min kaŝus inter viaj
odorplenaj
folioj ruĝkoloraj,
dum la horoj de l' nokt'
kvietserenaj,
dum la horoj, pro vi,
parfumodoraj.

Kun kia ĝu' mi tiam
dolĉe ripozus en kviet-
silento,
dum min dorlotuladus
vi, ĝis kiam
surprizus nin la sun' de
oriento
kaj jaluze, ebrilan je par-
fumo

min vaporigus ĝia fajra lumo!

Se mi estus argenta papilio
kun la flugiloj blankaj kaj graciaj,
mi ŝtelus plian blankon al lilio
por la flugiloj miaj

kaj mi ĉirkaŭflirtadus vin kokele,
nur vin; pro tio la ceteraj floroj
jaluzmurmurus kun ventet' sekrete,
ĉar ne min ravas per siaj koloroj,
ĉar nur vi estas lina
je l' admir' mia, nur vi min altiras,
ĉar nur vin amas mi per amo blinda,

(La poemon, verkitan de s-o Artur Domenec Mas el Barcelono, kiu gajnis la Naturan Floron, ni represas kun speciala permeso de Kat. Esp. Fed.)

Mallongaj Esp. Sciigoj.

Sveda lando.

En la sveda provinco Småland s-ano Einar Adamson, ĵurnalisto el Gefle, faris viglan propagadon dum la lasta monato. Publikajn paroladojn li faris en Norrahammar, Smålands Taberg, Huskvarna, Weiland, Smålands stenar kaj en Nässjö. Rezultatoj: En Norrahammar kurso kaj grupfondo kun 33 membroj, en Huskvarna kurso (24 p) kaj grupfondo, en Smålands stenar, Värnamo, Weiland kaj Smålands Taberg studo-grupo, en Nässjö grupfondo kun 21 personoj kaj kurso (gvid. s-o Nyström). Eĉ en Boden, urbo en plej norda parto de Sveda lando, funkciis kurso, gvidata de s-o Kristian Wikner. Ankaŭ

Tamen la memorajan monton Linda ne komencis prepari el tero, nek kreskigi el pirito. Ŝi timis: se al la posteuloj mankos tero, ili forportos mian monton; se mankos pirito, ili disportos mian monteton sur la vojojn. Mi faros monton, kiun nek la dento de l' tempo nek la mano de l' homo povus detrui.

Linda paŝas al Lasnamonto,**) komencas sur Lasnamonto derompi kahelajn kaj kolektit rokpecojn. Ŝi metas la kahelojn kaj la rokojn en la antaŭtukon, portas ilin al la tombo de Kalev. Ŝi portas tien rokojn kaj kahelojn, ĝis la tombo-monteto havas sufiĉe da alteco. Ŝi portas ilin tien, ĝis aperas la „Alturbo“ (Toompea) de l' nuna Tallinn.

Kiu scias, kiel alta Linda estus konstruita la tombmonteton de Kalev memoraje por la posteularo, se akcidento ne estus malhelpinta la daŭrigan konstruadon de l' monumento!

Jen Linda prenas grandegan ŝtonon en la antaŭtukon kaj intencas porti ĝin al la tombo de Kalev. Sed — ho vel! Subite disiriĝas la rubando de la antaŭtuko. La ŝtono elfalas el la antaŭtuko. Linda volas levi la ŝtonon de l' tero. Ŝi levas kaj levas, sed al ŝi mankas jam la necesa forto. Laceco forportis la forton garantiataje.

Linda falas sur la ŝtonon, ekploregas. Ŝi plendas pri soleca vivo, ŝi plendas pri vidveco, ŝi plendas unu horon, ŝi plendas duan. Ŝi plendas kaj verŝas larmojn. Larmo post larmo ruliĝas malsupren en la ŝtonminejon, kie Linda rompis ŝtonojn por la tombo de Kalev. Larmo aliĝas al larmo, larmoj kunigigas kun larmo. La okuloj de Linda fariĝis kvazaŭ fontoj ĉiam fluantaj. La ŝtonminejo pleniĝas per larmoj. La tero ne volas ensorbli tian multvalorajn en sin, sed deziras restigi ĝin kiel memorajo por la posteularo. La



ĉar nurpro vi, flor' ĉarma,
mi sopiras.
Kaj kiam mi jam laca
prolongoflirtad'serĉus
kuŝlokon,
ruĝa kuŝejo estus vi plej
paca:
brulantaj' surtenanta
neĝan flokon!
de blanko kaj purpuro
l' idilio:
sur brusto de reĝin'
blanka paĝio!

Se mi najtingal' estus
delikata
kun sonora trilado me-
lodia,
nestejo adekvata
estus via rozuj' por la
nest' mia.
De tie miaj triloj
jen gaje, kvazaŭ himno
glora, sonus,
kiam maŝene fajrsimilaj
briloj
de l' naskiĝanta sun'
hele vin kronus;
jen ĝeme, kvazaŭ plorsin-
gultoj plendus,
kiam la nokto, sterniĝ-
ante ĉie,
funebro kaj mallumon
sur vin sendus
kaj nigro kovrus vin
melankolie,

Per trilad' mia l' valo
kaj la mont' kaj l' arbar' kaj la rivero
sciigis pri l' amsent' de najtingalo
kaj pleniĝus de milda ammistero;
ĉar ĉu gaja l' kant' ĉu melankolia,
eĉ ĉiam laŭ ritm' de am' pasia.

Sed, ho ve, ne rosguto,
nek papili' hek najtingal' mi estas.
Por vi, reĝin', kiel vasaltributo
nur liri mia restas:
per ĝi laŭtiĝu mia amsekreto;
mi nur estas poeto.

la sveda gazetaro estas nun tre favora al nia movado.

En Nord-Okcidenta Moravio,

parto de Ĉeĥoslovakio, s-o Arno Janečka el Vitkovic aranĝis jenajn kursojn: en Popola Altlernejo (Lidova universita Masarykova) en Ostrava kun 23 p.; en la burĝa lernejo en Privoz kun 17 lernantinoj; en la urba komerca lernejo en Mar Hory kun 26 ĝelernantoj; la kluban kurson en Vitkovic vizitas 15 anoj kaj privatan kurson en la mastrumo de l' aranĝanto 9 gekomencantoj.

Zamenhof-Soleno en Liverpool

(Angl.) okazos la 16. dec. Kiu deziras ricevi la (arte presitan) programon, sendu 2 resp.-kup. al la sekr. s-o R. Prys Griffiths, 57 Ramilies road, Sefton Park, Liverpool.

larmoj ĉiam ŝveliĝas, la tuta ŝtonminejo fariĝas larmejo. La „Supera Lago“ naskiĝis el tiuj ĉi larmoj, kaj ĝi anoncas ankoraŭ al estanteco la ploran kaj funebro de Linda.

Laŭ M. J. Eisen

tradukis Helmi Drezon.

*) En estona lingvo la unua silabo estas ĉiam akcentata; la longeco de la silaboj estas ofte montrata per du samaj vokaloj.

***) Traduko de estonlingva „Lasnamägi“.

***) Traduko de estonlingva „Ülemiste järv“.

Kun ventego en paro...

En mia brust' ekdormis la ventego,
En mia kor' la fulmotondroj ardas,
Animon mi kiel la ŝtalon hardas
Kaj kovras ĝin per malmolfera tego.

Kun uragan' mi estas bonkolego,
Ĉar de malfort' sukcese ĝi min gardas;
Estonton nur kuraĝe mi rigardas,
Timigas min nenta nun fortego.

Kaj kie plej kruela vento bruas,
Kaj kie plej minacaĵa danĝeroj,
Plej forte fulmotondro teron skuas —

Tie mi sentas min en miaj sferoj...
Pleniĝas kor' per vera la kontento:
Ĉar ja mi mem ventego-elemento.

Stanisław Karolczyk
(Eska).

Eklezio.

La 27. okt. parolis s-o H. F. Pothart pri Esperanto por la romkatolikoj de Hago, Nederlando. Kurson nun gvidas s-o J. P. Zentgraaff.

S-o Luis Kelety,

veturonta el Rumanio al Argentino, petas nin pri publikigo de siaj laŭvicaj adresoj. De 21.—26. nov. li estos en Berlin, Hauptpostlagernd; la 29. en Amsterdam, per adreso de s-o P. J. Bondix, del. de UEA, Nassaukade 59, II; de 1.—6. dec. en London, Poste centrale restante; en Southampton li enŝipiĝos la 9. dec. je ŝipo „Almanzora“, R.M.S.P.; la adreso en Buenos Aires estos: Luis Kelety, calle Caseros 528. Invitantoj (pro lumbilda parolado) pagos parton de la vojaĝkosto. (Vidu koncernajn anoncojn en antaŭaj numeroj de ET.)

Pola lando.

„Pola Esp. Servo“ en Bydgoszcz (Bromberg) fariĝis akcia societo kun limigita garantio (akcia kapitalo 2000000 pmk., el kiuj 300000 estas signitaj). PES eldonis dum lasta monato specialajn afiŝojn, poŝtkartojn kaj glumarkojn por propagando. La interrilata kaj ekspeda centrejo de „Express“ akceptis Esperanton por siaj eksterlandaj interrilatoj. — Novaj grupoj en Olkusz (Pola Esp. Soc.) Piotrkow (Soc. de junaj esperantistoj), Czestochowa kaj Wyrzysk. — Kursoj en Bydgoszcz (2 polingvaj, 1 germanlingvaj), Jaroslaw, Siedlce, Tczew kaj Zakopane. — En Warszawa okazis la 25. okt. ĉefkunveno de „Konkordo“, la 1. kaj 2. nov. konferencoj de polaj esperantistoj.

En Jonava (Litovio)

la 1. nov. malfermiĝis kurso kun 20 personoj (gvid. s-o H. Fejn); en Jonava troviĝas nun jam 40 esperantistoj.

Por la malsatantaj rusoj

ni ricevis entute nur unu donacon: 15 fr. fk. kolektitajn de f-ino Casale en Marseille.

Esp. kiosko

gvidata de f-ino Gérard kaj organizita de s-o Rousseau troviĝas en la franca ekspozicio de aerveturado, malfermiĝinta la 12-an de novembro en la Granda Palaco en Paris.

En Ceret, Pireneoj, Franc.

s-ino Julia gvidas kurson por 9 lernantoj de la supera lernejo.

Saar-Teritorio.

La esp. grupo Friedrichsthal aranĝis lundon la 7. nov. propagandan vesperon. Post parolado de s-o Schenkel anoncis sin 35 partoprenantoj por kurso, kiu komencos fine de novembro.

Esp. kongresoj en germanlingvaj landoj.

En printempo okazos okcidentgermana esp. kongreso de Revelo en Hagen i. W. La 25.—26. marto okazos sudgermana esp. kongreso kaj ekspozicio en Salzburg, Aŭstrio (adreso: Mönchsberg 8). Por la 11-a Germ. Esp. Kongreso, kiu okazos en Breslau je Pentekosto, anoncis sin jam 102 partoprenantoj.

La esp. vivo en la loka grupo de Plauen (Germ.) estas, laŭ ricevita raporto (tro detala por nia ĵurnalo) tre vigla kaj interesplena. Kunveno okazas ĉiuvendrede en kafejo „Trömel“. Dum la kunveno okazis paroladoj pri „Urboj en Baltlando“ (Riga, Reval-Tallinn k. a.) kaj pri „Blinduloj“. S-o Röder donacis 100 poŝtkartojn, kies vendado rezultigis sumon de 35 gmk. por „Esperanta Ligilo“.

En Freiburg, Germ.

komencis la 11. nov. kurso kun 41 personoj en la popola Altlernejo. (gvid. s-o Frz. Döring). Ĉiuj ĵurnaloj de Freiburg enhavis artikolojn pri Esperanto. Gravaj ĉi-tielaj firmoj anoncas daŭre en ET.

Nia movado en Bulgario.

S-o Georgi Aktarĝiev, prez. de Bulg. Esp. Soc., estas nomita de la ministro de l' popola

Lernejo.

En la ŝtata Universitato de Liège (Belgio) s-o Derigat komencis kurson la 9. nov.; ĉ. 80 ĝelernantoj (ĉu gestudentoj de la Universitato?) partoprenas ĝin.

Asocio de Diplomataj Esperantistoj.

Nova asocio ĵus fondiĝis en Liverpool, Angl. Prof. W. E. Collinson estis elektata prezidanto kaj s-o R. Prys Griffiths sekretario. Celoj de la asocio estas krei fortan rondon de kapablaj diplomitoj, kiuj scipovas entrepreni la instruon de Esperanto en sia regiono, interŝanĝi ideojn rilate al la instruo de Esperanto kaj, de tempo al tempo, fari modelajn lecionojn, diskuti lingvajn punktojn kaj prikonsideri la rajtojn kaj privilegiojn de la anoj ĉiurilate. La proksima kunveno okazos la 6. dec. (kun diskuto pri la refleksiva pronomo „sia“).

Insiste ni petas

niajn negermanajn abonantojn kaj anoncantojn ne pagi per poŝtavizo, ĉar per tio ni perdas konsiderindajn sumojn. Jen unu ekzemplo: Samideano el Ĉeĥoslovakio sendis al ni per poŝtavizo 26 Kč. kiel donacon por „Esperanta Ligilo“. La poŝto pagis al ni nur 40 gmk., dume — ŝanĝante ĉeĥajn monbiletojn ĉe banko — ni estus ricevintaj je la sama tago 75 gmk., do preskaŭ la duoblont Cetere, la negermanajn monbiletojn, kiujn ni ricevas por „Esp. Ligilo“, ni ne ŝanĝas kontraŭ germana mono por ŝpari la procentaĵojn de la banko kaj por eviti eventualan kurzperdon, sed sendas senpere al la redaktoro de „Esp. Ligilo“ mem.

Do, ne donacu al la poŝto monon, kiu pli multe utilos al esperanta entrepreno!

instruado membro de la komisiono, kiu preparos la novan programon por instruado en la realaj lernejoj. S-o A. reprezentas en tiu komisiono la lernobjekton Esperanto. — En Haskovo s-o leŭt. Stefan Radev gvidas kurson. En Sumen komenciĝis kurso por progresintoj.

Malavara donaco de bulgara samideano.

S-o Dimitr Kančev faris al la loka grupo Sumen gravan donacon: parcelon en la mezo de la urbo (ĉ. mil kvadratoj) por konstrui en templa de 10 jaroj specialan Esp. Hejmon kun Esp. Lernejo; li donacis ankaŭ 10000 levojn por komenca fundo por la estonta konstruaĵo.

La urbestro de Tokio por Esperanto.

S-o M. Ga skribas al ni el Tokio: Antaŭ kelkaj semajnoj (t. e. en septembro) mi, persone vizitante baronon Goto, urbestro de Tokio, priparolis Esperanton. Tute aprobinte mian opinion, li promesis min helpi je mia klopodo pri Esp. Hodiaŭ (1. okt.) vespere en sia nomo, la urbestro aranĝis priesperantan paroladon ĉe la urba biblioteko „Hibiya“, ĉe kiu mi kaj d-ro Ramsfeldt faris paroladojn kaj barono G. mem bonvole ĉeesti kaj fari rekomend-paroladeton por d-ro R. La aŭskultintoj kalkuliĝis ĉ. 400 personoj. Mi esperas, ke ĉi tiu okazintaĵo faros impreson ne nur multe enlande, sed ankaŭ multemulte tra la mondo. La estro de la biblioteko rakontis al mi, ke li nun sufiĉe inklinas al nia lingvo kaj decidis enaĉeti multe da esp. libroj en la bibliotekon, kiu ĝis nun havis preskaŭ neniujn. — La paroladoj fariĝis „Pri nuna stato de Esperanto en la mondo“ (M. Ga) kaj „Pri la nove memstara ŝtato Finnlando“ (d-ro J. G. Ramsfeldt, finna ambasadoro en Tokio kaj eksministro, en Esp. kun interpretado de M. Ga). Barono Goto, urbestro de Tokio, estas fama ŝtatisto kaj eksministro por eksterlandaj aferoj.

El Aŭstralio.

En Melbourne kunvenas ĵuvene de 40 samideanoj. — En Perth s-oj Leighton kaj Caine gvidas kurson por lernantoj. Konversacia rondo kunvenas ĵuvene. — En Sidney s-o John Joliffe gvidas kurson kun 20 p. — En Whangarei, Nova Zelando, funkcias esp. grupo. Unu sinjoro telegrafas al amiko per senfadena telegrafo en Esperanto kaj trovis, ke lia sendaĵo estis ricevita tute ĝusta.

Por „Esperanta Ligilo“

alvenis pliaj donacoj: 57. Esp. Grupo de 1910, Essen 70 gmk. — 58. R. S. Heinhuis, Wormerveer 1/2 hfl. — 59. H. H., Heerlen 20 gmk. — 60. Esp. Grupo Neustadt O/S. (2-a donaco) 56.50 gmk. — 61. Albert Haber, Metz 5 fr. fr. — 62. P. Glöckner, Freiberg 4 gmk. — 63. R. Kropfgans, Kauschwitz 7 gmk. — 64. Kalman Papp, Pápaokladany 100 austr. kr. — 65. M. Muribo, Bekkeleghogda 2 norv. kr. — 66. Otto Schönmann, Graz 100 austr. kr. — 67. Prof. R. Tankredi, konsulo de Intern. Asocio Blind. Esp., Potenza 3 lir. — 68. Innocenzo Lapenta, Potenza 1 lir. — 69. Vaclav Čansky, Nusle 5 kč. — 70. Esp. Grupo Krefeld 20 gmk. — 71. Jos. Halasz, Targul-Mureș 50 gmk. — 72. Esp. Centro Targul-Mureș 50 gmk. — 73. Ges-oj Blicher, Kobenhavn 23 dan. kr. — 74. Esp. Grupo Bremen 20 gmk. — 75. Shigeo Narita, Paris, 5 fr. fr. — 76. W. H. G. v. Tinteren, Amsterdam 50 gmk. — 77. Kolekto ĉe la „Verda Kato“, esp. kabaredo, Paris, la 9. nov. 56 fr. fr. (ĉeko). — 78. J. Grünthal, Haapsalu 25 gmk. — 79. Esp. Grupo Lausanne kaj anonimulo, entute 579.50 gmk. — 80. V. Hendricx, Gent 25 gmk. (1/2 b. fr.)

La Senlingvulo.

Rakonto de Viadimir Korolenko.

Rekomendita de Esperantista Literatura Asocio.

Tradukis laŭ la 5-a rusa eldono kun permeso de la aŭtoro Maria Ŝidlovskaja.

(41-a daŭrigo.)

La unua provo forpreni la kadavron montrigis sensukcesa pro la kontraŭstaro de la forte ekacitita homamaso. Sed poste, kiam la polica faktamento estis plifortigita, ĝi fine atingis la celon, kiam ni devis konfesi, ne sen helpo de bastonoj, kiujn, kiel ni jam diris pli ol unu fojon, niaj policanoj bedaŭrinde uzas ofte en cirkonstancoj, tute ne pravigantaj la uzadon de tia batalilo en civilizita lando kiel la nia. Je destinita horo venis sur la placon fama laborista oratoro s-ro Hompers, akompanata de orkestro kaj sub standardo kun jenaj devizoj:

Laboron!
La pacienco de la popolo elĉerpiĝis!
Kuniĝu!
Petskribo al la nova urbestro.

La senpartiteco postulas aldoni, ke krom tiuj vortoj la standardo surhavis ankoraŭ la jenajn:

Indeco, ordo, disciplino!

Krom tiu raporto en la gazeto troviĝis ankoraŭ dua artikolo, kiu ankaŭ havis tri surskribojn: Charles Hompers estis maldolĉa. Li mallaŭdegis riĉecon kaj lukson. Li mallaŭdegis la sociajn aranĝojn de nia lando kaj la urbejon li nomis Babela malĉastulino. Charles Hompers, kies oratoria talento meritas nian admiron, bonege utiligis la situacion. Apenaŭ

Internacia Esp. Servo.

(En la intereso de la esp. propagando estas dezirinde, la artikolojn sub tiu ĉi rubriko traduki kaj represi en naciaj ĵurnaloj, aldonante la vortojn „Internacia Esperanto-Servo“ kaj sendante 1—2 ekzemplerojn de la koncerna ĵurnalo la redakcio de ET.)

LETERO EL LATVIO.

Riga, 1. nov. 1921.

Malgranda Latvio, centro de la Baltaj regnoj, pli kaj pli montras la saman ekonomian resaniĝon kiel ĝiaj ambaŭ najbaroj Litovio kaj Estonio. Sed, se la lastaj kreas la novan vivon sur la bazo de senĉesa kaj persista laboro, Latvio devas havi dufoje pli grandan laborenerĝion, ĉar ĝiaj vundoj pro la mondmilito estas pli profundaj.

Sen troigi oni povas diri, ke Latvio estas la plej multesuferinta lando dum la Eŭropa brulego. Konstanta ŝanĝiĝo de rusa, germana kaj komunist-regadoj dum kvin militajaj tute dezertigis la landon, kiu perdis tutan sian industrion, forveturigitan al Rusio en komenco de la milito per 30000 vagonoj, siajn fervojmaterialojn, 80% de sia vasta ŝiparo, 25% de la konstruaĵoj kaj 20% de la loĝantaro.

Tiel la juna respubliko ĉe sia fondiĝo antaŭ tri jaroj havis vere katastrofan staton. Kaj kiam la komunistoj sub premado de la nacia armeo devis reiri al Rusio, ili lasis la landon tiel prirabitan, ke ĝi nenfakaze povis nutri eĉ sian malmultenombrian loĝantaron. La registaro devis uzi tutan sian energion por liberiĝi de malbona rusa heredaĵo: malsato. Komenciĝis vigla eksporto de latvaj krudaĵoj — ligno kaj lino — kaj samtempe renovigo de detruita industrio kaj terkulturo. Ĉio postulis grandajn elspezojn, kovratajn per novaj eldonoj de papermono, kiu tial pli kaj pli malvaloriĝis. Oni jam profetis, ke ĝi havos la saman sorton kiel valuto de najbara Polonio, kiu troviĝis en vere kompatinda stato.

Printempe la posteno de ministro de financoj estis konfidita al estinta industriisto Kalnings. Politiko de tiu ĉi sperta ekonomiisto estis: ŝparemo, ŝparemo kaj ankoraŭfoje ŝparemo. Kaj sisteme enkondukita ŝparemo baldaŭ montris siajn rezultatojn — jam post kelkaj monatoj la latva valuto komencis plialtiĝi, kaj samtempe la prezoj falis. Dum du jaroj de mastrumo kun deflito Latvio sukcesis jam renovigi atendiindan parton de sia industrio, kio siavice bone influas la plimalgrandiĝon de l' importoj, kaj la samtempa renoviĝado de la terkulturo, doninta tiun ĉi jaron riĉan rikolton, estas plua kaŭzo de l' sukceso atingita en financa rilato. Nuntempe Latvia valuto jam tiom valorigis, ke plua plialtiĝo ne estas dezirinda pro la intereso de l' eksportkomerco. Samtempe jam estas stampataj latvaj naciaj ormoneroj — „lat'oj“ (= ora franko), kiu estos laŭgrade enkondukata anstataŭ la nuna provizora valuto: latva rublo.

Pligrandiĝanta postulado de latvaj eksportoj, konstante kreskanta industrio kaj ĉi tiu laboremo de la latva nacio donas certecon, ke ĝi atingos same brillan venkon ekonomie kiel ĝis nun politike dum la bataloj pro sia sendependeco.

Z. Indra.

Gazetaro.

GERMANIO.

Notojn aŭ artikolojn enhavis:

Falkenstein Anzeiger n-o 82.
Geraisches Tageblatt n-oj 206, 262.
Bayerische Verkehrsblätter München 22. 10.
Vogel Anzeiger und Tageblatt Plauen 6. 11.
Leipziger N. Nachrichten 10. 11.
Mylauer Zeitung 12. 11.
Nachrichten für Treuen 12. 11.
Oelsenitzer Tageblatt 12. 11.

Esp. Angulojn enhavis:

Auerbacher Zeitung 6. 11.
Niederrh. Sonntagszeitung Krefeld 6. 11.
Falkenstein Anzeiger 11. 11.
Stollberger Anzeiger und Tageblatt 12. 11.

Linksrheinischer Anzeiger, Horrem, Germ. (Enhavas ĉi-semajne notojn pri la esp. grupo.)

L'Echo du X-e, organo de la respublikana ĵurnalo, Paris, nov., enhavas artikolon kun portreto de s-o Archdeacon. Neue Lodzer Zeitung, Lodz, Pol., 6. 11. (Esp. Angulo. — Traduko de „Letero el Brazilio“ laŭ ET)

Parolejo.

105. Propono por la XIV-a kaj sekvontaj kongresoj.

Opiniante, ke estas necese suprenlevi nian movadon pli ol ĝis nun el la sferoj de la organizaj kaj propagandaj demandoj, mi proponas, ke dum nia mondkongreso estu farata i. a. paroladoj pri la lando kaj la kulturo de la popolo nin gastiganta. Nia movado jam estas sufiĉe disvastiĝita, ke ni certe trovos fakulojn por la diversaj temoj. Per tio, mi kredas, multaj pliaj homoj estos interesigataj pri niaj kongresoj kaj komencos lerni nian lingvon. Esperable niaj fervoraj finnaj samideanoj, kunmetante la programon por la XIV-a, jam agos tiucele. (P. Gl.)

Recenzejo.

(Unuope senditajn librojn ni mencias, duoble senditajn ni recenzas. Monataj esp. gazetoj sendu du ekzemplerojn interŝanĝe kontraŭ unu ekz. de nia semajna ĵurnalo.)

Nia artikolo „Justeco al ĉiu“ en n-o 57 bedaŭrinde ne kontentigis amikojn de s-o sac. Bianchini. Oni postulas, ke ni ordonu al nia recenzanto repreni insulton al s-o B.; alie oni minacas fari bruan pro la afero en alia esp. gazeto.

Antaŭ ĉio, ni devas konstati, ke la recenzo ne enhavis insulton, kaj ke la recenzinto neniel intencis ofendi la honorindan aŭtoron. Sed ni akcentas denove, ke — klarigante esp. prononcon al internacia publiko — oni ne devas konsideri nur la prononcon de sia propra nacio. Se la honorinda sac. B. sekvas nian konsilon aldonante korektiĝan paĝon al sia gramatiketo, la afero estos finita, la gramatiketo estos taŭga, kaj estas nenecese fari pluan bruan pro ĝi. Cetere, se oni ne volas akcepti atentigojn pri evidenta eraro, oni fine devigos nin recenzl jam nur nepre senerarojn librojn kaj nur menci la erarhavajn. Ni estu pli larĝanimaj kaj ne ofendiĝu pro ĉia bagatelo. T. J.

LIBROJ.

ĈU LA KULTURITAJ NACIOJ BEZONAS KRISTANISMON? Mediteroj notitaj de H. Salokannel. Vendata por la bono de blindaj esperantistoj. 16 pĝ. 11:18 cm. Mendeblo ĉe O/Y Movado A/B, Helsinki, Finn., Kasarminkatu 20. 1921. Prezo broŝ. 2 fmk. aŭ 5 resp.-kup.

Ĉi tiu malgranda broŝureto, kies enhavo prilaktas la necescon de religio en pli nobla formo, t. e. spirituala kristanismo por la kulturitaj nacioj, estas kvazaŭ parolado aŭ prediko tute laŭ la nuna „tempospirito“. — La aŭtoro, kiu dediĉis sian verketon al pastro Pätilä, ĉefredaktoro de „Kristana Espero“, akcentas, ke la kristanismo bezonas revivigon kaj plendas, ke oni penadas forigi la kristanisman el niaj lernejoj kaj anstataŭigi ĝin per moralinstruo. — La libroto estas atentinda, kvankam la pensoj en ĝi ne estas novaj; ili meditas ĉiujn socio-logojn iam de post la mondmilito. Kelkaj preseraroj kaj gramatikaj malĝustajoj ne ĝenos la leganton.

Ĉe la sama presejo en Vaasa aperis GVIDFOLIO POR ENMIGRANTOJ EN USONO, eldonita de la „Luterana Enmigra-Societo, Enkorporita“, Nov-Jorko; 2 pĝ., redaktita de pastro Hanssen ricevebla ĉe mislisto pastro O. H. Restin, 208 E. 61 d Street, New York, U. S. A. Pastro R. sin okupas pri la protekto de emigrantoj al Usono. La gvidfolio enhavas gravajn konsilojn kaj scigojn pri ĉio, kion ĉiu emigranto nepre devas scii. — Petantoj aldonu resp.-kup., se ili skribos al pastro Restin. (G. Ajut.)

BILZ, ORAJ REGULOJ POR LA VIVADO. Kun 80 ilustraĵoj kaj multaj artaj aldonoj. 96 pĝ. 14:22 cm. Eldono de F. E. Bilz en Dresden-Radebeul, Germ., 1907. Prezo: lukse karton. 8 gmk.

de s-ro Hompers je la neniganta demando de la respektinda oratoro. —

La gazeto plenumis sian promeson. Ĝi presigis unue — portreto de s-ro Hompers, due — detalan priskribon de lia interparolado kun la raportisto.

— Sinjoro Hompers en sia privata vivo estas homo ĉarma, tre simpatia; li akceptis nian raportiston afable, ĝentilege, parolis pri la afero kun multe da fervoro, da energio. Li kulpigas pri ĉio la senceremoniecon de la urba polico. Li mem restis „en ordo“. Certe, kiel jam skribis nia raportisto, en sia parolado li estis „maldolĉa“. Tion li ne neas. Sed de kiam la amerikano estas devigata en sia lando paroli nur dolĉajn paroladojn? Al kiu ne plaĉas la komparo de nia urbejo kun malĉastulino, tiu ne devas dimanĉe aŭskulti predikojn ekzemple de la respektinda s-ro pastro Johns⁸⁰), ĉar tio ja estas lia amata komparaĵo. Tamen neniu kulpigas la pastron pri ekscitado de malbonaj pasioj aŭ pri ofendado de la lando! Sed mi opinias, ke „Tammany-ring“, kies agema membro estas s-ro Robinzon, ne posedas ankoraŭ la potencon limigi en nia lando la liberecon de parolo, donacitan de la grandaj kreintoj de nia konstitucio (ĉiloke la raportisto tre bedaŭris, ke li ne kapablas reprezenti la beligan geston, nek la majestatan patoson, kun kiu s-ro Hompers diris la lastajn vortojn; li nur konstatas, ke ili farus honoron al la ĉefaj oratoroj de la lando). S-ro Hompers treege bedaŭras la okazintaĵon, sed kiel viktimojn en ĉi tiu afero li konsideras sin kaj siajn partianojn, ĉar la meeting'o malsukcesis, kaj la rajto de kunvenado estis maldelicate rompita. La komencon de la tumulto li ne estis vidinta. —

Respondi la demandon de la respektinda senatoro estas multe pli facile ol kompreni kelkajn

⁸⁰) Elpar.: „Gons“.

Dissidante ĉi tiun interesan regularon, kiu jam aperis en 1907, la eldonejo deziras ree atentigi la kulturitan mondon pri la neceseco de vivreformoj. Ke la eldono ne estas nova, tion jam pravas la vere luksa papero kaj la orumitaj ornamaĵoj de la librokovrilo. „Revenu al la naturo! Sanigu vian korpon! Plilongigu vian vivtempojn!“ Jen koncize la postuloj kaj admono de l' konata Bilz. Ĵu laŭnature vivanta homo ĉerpos multon el ĉi tiu ora regularo. — La pres-kaj stil-erarojn multnombro troviĝantaj en la libro oni ne devas trokritiki, ĉar ĝi ne estas destinita por lingva instruo, sed por klarigo de grava kultura ideo. Kompare kun la luksa aranĝo de la libro, la prezo estas tre modera; tial ĉiu havigu al si la libron.

POSTRIKOLTO. Suplemento al „El Parnaso de Popoloj“ de Antoni Grabovskij. 24 pĝ. 10 1/3:15 cm. Eldonis Julio Mangada Rosenbrn. Jaca (prov. Huesca), Hispanio. 1921. — Prezo broŝur. unu resp.-kup.; senpage por abonantoj de „Hispan Esperantisto“.

Legante la postlasitajn poemojn de nia poeto Grabovski ni sentas maĝojn pro lia frua morto. Kvazaŭ adiaŭantaj sonoj estas ĉi tiuj lastaj paĝoj de l' parnaso de popoloj. Grabovski kolektis perlojn el la kanitrezoro de ĉiuj nacioj. La suplemento enhavas versojn el angla, blankrutena, bohema, franca, germana, hispana, itala, jida, malta kaj pola lingvoj. — Ni dankas s-anon Rosenbrn, ke li eldonis la broŝureton, donacante al ni memorojn tre karan. — Oni havigu baldaŭ al si la poemon, ĉar la eldono ne estas granda. (G. Ajut.)

GAZETOJ.

ARGUSO. Meksiko, Apartado 10—100. Laŭdinta estas la entreprenado de la eldono, per aperigo de esp. revueto propagandaj por nia afero en sia lando. Sed li devas ankoraŭ multe perfektigi en la lingvo.

AGITANTO. Okt.

BULGARA ESPERANTISTO. Okt.

ESPERANTO-PRAKTIKO. Nov.

LA SUDA KRUCO. Sept.

ESPERANTA LIGILO. Adreso: Stockholm, Sved., Majora-gatan 12.

TAGIĈO. Bydgoszcz Pol., Kordeckiego 1 a. Oficiale organo de „Esp. Asocio de Polujo“.

Du Konkursoj de ET

por ricevi internaciajn spritaĵojn kaj anekdotojn.

I. SPRITAĴOJ.

Premioj:

- 1 tutjara abono al ET,
- 2 duonjaraj abonoj al ET,
- 4 kvaronjaraj abonoj al ET
- 5 „Lastaj Tagoj de D-ro Zamenhof“.

Kondiĉoj:

1. Ĉiu konkursanto rajtas sendi plurajn spritaĵojn; sed ĉiu spritaĵo devas esti skribita sur aparta folieto. La spritaĵoj devas esti signifitaj per la devizo kaj per la nomo de la lando, el kiuj ili devenas; por sendanto de pluraj spritaĵoj sufiĉas unu sama devizo. La nomo de la sendanto ne estu scigata.
2. La spritaĵoj devas alveni ĉe la redakcio de ET ĝis 1. marto 1922.
3. Ĉiuj senditaj manuskriptoj fariĝos posedaĵo de la eldonejo de ET, kiu rajtas aperigi ilin en ET aŭ en libra formo sen pago de speciala honorario.
4. Juĝistaro estos la redaktoro de ET kaj kelkaj aliaj kompetentaj samideanoj ankoraŭ elektotaj.
5. La devizoj de la premiitaj spritaĵoj estos publikigitaj en ET, por ke la sendintoj indiku sian nomon.

II. ANEKDOTOJ.

La samajn premiojn ni destinas por sendontoj de internaciaj anekdotoj. Por tiu konkurso validas la samaj kondiĉoj kiel por la unua. Sed spritaĵojn kaj anekdotojn oni sendu aparte kaj kun malsamaj devizoj.

artifikojn de Tammany-ring. Kiel li jam diris, li neniu instigis al atakado de la policanoj, same kiel li ne instigis la policanojn al trouzo de iliaj bastonoj. Sed li estas certa, ke la grava demando pri riĉeco kaj malriĉeco devas esti solvata per libereco de parolo kaj de unuigoj. La fruokoj de lia agitado oni jam nun povas vidi. Antaŭ du jaroj la Laborista Unuigo, kies prezidanto li havas la honoron esti, kalkulis nur duonon de la nuntempa anaro. Tial estas la senperaj rezultatoj. Pri la pli malproksimaj rezultatoj s-ro Robinzon, senatoro kaj posedanto de granda fabriko, havas ion por diri, ĉar en lia propra fabriko de post la pasinta jaro la horoj de laboro estas malpligitaj sen malpligrandiĝo de la salajroj. Ni flere antaŭvidas, — aldonis s-ro Hompers kun neimitebla fronto, la tagon, kiam s-ro Robinzon devos ankoraŭ plialtigi la salajrojn sen pligrandiĝo de labortago. — Fine s-ro Hompers sciigas, ke li intencas komenci proceson antaŭ la ŝtata juĝisto pri la okazinta rompo de la libereco de kunvenoj. — Sciate estas, — li diris, — ke la scienculoj de la lando ĝis nun ne prosperis klarigi al si la demandon pri la nacieco de la enigma sovaĝulo. Tamen mi ne perdas la esperon, ke la juĝistaro havos pli bonan sukceson kaj eble la polica direktoro jam nun estas ĝuste informita pri tiu punkto. — Por diri mallonge, — tiel finiĝas la noto, — se oni flankenmetos kelkajn delikatajn demandojn, kiuj kaŭzas eble justan mallaŭdon, s-ro Hompers montriĝis ne nur bonega oratoro kaj sagaca politikisto, sed ankaŭ tre agrabila interparolanto, posedanta senduban sinceran patoson kaj altspiritan pensmanieron. S-ro Hompers mem estas certa, ke li kaj liaj samcelanoj bone servas al la lando, enportante organizadon, ordon, konscion kaj esperon en la medion, el kiu malriĉeco, malespero kaj justa indigno facile povus krei adeptojn de la anarĥio. —

(Daŭrigota.)

XIV-a Universala Kongreso de Esperanto Helsinki-Helsingfors (Finnlando) Augusto 1922.

Nia Dekkvara devas fariĝi grandioza manifesto por la ideo de Lingvo Internacia! Samideanoj intencantaj partopreni jam nun aliĝu laŭ adreso: XIV-a Kongreso de Esperanto, Helsinki (Helsingfors), Finnlando. Kiel unua internacia kongreso en Finnlando ĝi havos tute specialan signifon.

Abonejoj de ET en la landoj

Belga: Frans Schoofs, 45, Kl. Beerstraat, Antwerpen.
Bulgara: Georgi Ĥr. Gaŝevski, Bul. Marie Luiza 46, Sofia.
Ĉeĥoslovaka: Otto Šlenčka, Hradec Kralové.
Estonia: Est. Esp. Unuiĝo, postkasto 6, Tallinn.
Finna: O/Y. Movado A/B., Kasarminkatu 20, Helsinki.
Franca: Esp. Centra Librejo, 51 rue de Clichy, Paris 9.
(Abonprezo: 0,45 flk x nombro da dezirataj sinsekvaj numeroj.)
Hispana: Konrado Doménech, Ĝerono, Rambla Alvarez 12-2.
Hungara: Paŭlo Balkanyi, Hajos-utca 15 II-2, Budapest VI.
Litova: Paŭlo v. Medem, Smeliu g. ve 12, Kaunas (Kovno).
Pola: Adolfo Oberrotman, Krak-Przedm. 10, Warszawa.
— Pola Esp. Servo (Fr. Prengel), Kordeckiego 1a, Bydgoszcz-Bromberg.
Sveda: Förlagsföreningen Esperanto, u. p. a., Stockholm 1.
U. S. A.: The Esperanto Service Corporation, 500 Fifth Avenue, New York City.

Pligrandigaj Aparatoj Poŝtmarko - Kameroj

Poŝtmarko 6x9

Maŝinoj por oblika tranĉado en solida kvalito estas fabrikataj de

P. Tzschachmann, Freiburg i. Br. (Germ.)
Fabrikejo de fotografaj aparatoj

Katharinenstr. 15. Katharinenstr. 15.

Eksporto al ĉiuj landoj. — Rezentantoj serĉataj.
Prospektoj kun prezoj laŭ deziro.

Freiburger Kassenschrankfabrik Karl Schuler Freiburg i. Br. (Germ.)

Hugstetterstr. 8/8a.

Speciala Fabrikejo por monŝrankoj, libroŝrankoj, nepriŝteblaj ŝrankoj por dokumentaroj, sekretaj murŝrankoj kaj kasetoj.

Eksporto al ĉiuj landoj.

Oni petu specialan proponon.

Rezentantoj serĉataj.

Korespondantoj! Atentu!

Ĉiu el vi havas, kiel mi scias laŭ propra sperto, la deziron, posedi fotografajn de sia korespondanto aŭ -ino. Sed la kutimaj fotoj estas hodiaŭ tro multekostaj por tiu ĉi celo. Mi povos al vi liveri por tiu ĉi interŝanĝo tre malmultkostajn belajn vizitkartojn kun via fotografajo.

Prezo por 100 kartoj kun bildo kaj nomo 30 mk., kun kompleta adreso 35 mk. Formato 95 : 45 mm. Farotaj laŭ ĉiu ajn fotografajo, kiu estos resendata sendifekte. Livrettempo 2-3 semajnoj. Alsendo per rekomendita letero.

Ferna-Versand, Plauen i. Vogtl., Germ.,
Antonstr. 31.

Eksporto - Firmoj kiuj interesiĝas pri la eksporto de Blankaj Brasikoj

povagone, bonvolu tuj sciigi la firmon **Basilio Travaglia, Trento (Ital.)** pri eksportebleco, prezo, pago kaj liverokondiĉoj.

Korespondado en itala, germana, franca lingvoj kaj en Esperanto.

Kiam troviĝos sufiĉaj abonantoj, aperos malgranda revuo

La Mondo Politika.

Jara abonkosto 3/6 ŝil., t. e. 14 resp.-kup. Ne sendu monon tuj, sed anoncu vin kiel abonanto.

Oni invitas artikolojn nepagotajn Bonvolu enmeti kuponon, se necesos respondo.

Redaktoro,
4 Princeton St., London W. C. 1.

Tutlanda Estona Junulara Unuiĝo

(Ülemaaline Eesti Noorsovo Ühendus)

petas sendi informon pri

junulara vivo en ĉiuj landoj de la mondo,

mallongajn priskribojn pri iliaj organiza-

zioj kaj unuiĝoj ekster kaj en la

ternejo. Volonte ankaŭ interŝanĝas

ĵurnalojn aŭ gazetojn de junularo

(naciilingv. aŭ esp.) manskribitajn,

hektografitajn aŭ presitajn.

Sendajn adresu al A. Jöger, Villardi tän 13-9,
Tallinn, Estonio. :: La poŝtelspezojn oni kompensas.

Horloĝoj ĉiuspecaj

poŝ-vechorloĝoj, malgrandaj vekhorloĝoj, star- kaj murhorloĝoj en plej bona kvalito. — Demandu prezaron! — Rezentantoj serĉataj.

HERMANN TOBUSCH,
horloĝ-eksporto, Freiburg i. Br.
Kaiserstr. 16. (Germanio).

Bulgaraj poŝtmarkoj

uzitaj, el la dum- kaj postmilitaj eldonoj, en granda kvanto, estas vendataj.

Tuj scilgu la prezon, laŭ kiu vi aĉetas cent diversspecajn poŝtmarkojn. Nur mendoj por pli ol dek mil pecoj estas plenumotaj.

Mendu ĉe:

Hristo Naĉev, str. Denkoglu 30a, Sofia, Bulgario.

Franz Döring, Freiburg i. Br.

(Germanujo) Zalusstr. 6

Pogrand-Komerc de Ligno

Tel. 2017. ☐ Telegr.-adr.: Holzöring Freiburgbr.

ofertas:

Normaltipajn

Fervoj-relajn Trabojn

el kverko aŭ fago (angle „Sleepers“)

en ĉiuj dezirataj

mezuroj, precipe por Anglujo, Belgujo, Francujo.

Pogranda Manufaktura Magazeno

de en- kaj eksterlanda manufakturo

M. Bukszman, Varsovio

Nalewki 29 Telefono 266.39

deziras ligi komercajn rilatojn kun gravaj manufakturaj firmoj.

Babcock-Wilcox Akvtubo-Kaldronoj

por normala kaj tre alta vaporigo estas fabrikataj de

FRATOJ STORK & K-io HENGELO (O) NEDERLANDO

: Fabriko kun pli ol 2000 laboristoj. :

— Esperanto korespondata. —

Nur petoj de seriozaj firmoj estas konsiderataj.

Anoncetoj.

FIANĈIĜO. S-o prof de Esp. Hanns Sappl, Graz, ĉefsekr. de Moka kaj IKUE, fianĉiĝis kun f-ino Miĝi Weber, Graz, aŝtervid. prezidantino de la Kat. Esp. Societo „Por alta celo“.

GEEDZIĜO. Georg Rülke kaj Anna Rülke, nask. Rauschenbach, geedziĝis. Göppersdorf apud Burgsdorf (Saksa I.), 12. nov.

ALFABETUMOJN naciajn, eĉ uzitajn, deziras ricevi H. Janverk, Vazalemo, Estonio. Same la stenografisistemon de Ĵirotofski (rusa) kaj „Paragon“ (angla-amerika).

GEINSTRUISTOJ diversnaciaj! Bonvolu alsendi ABC-lernolibron por elementa lernejo laŭ plej nova sistemo verkitan, eble uzitan. Kun simila komplezemo Kalman Papp, instr., Püspökkladany, Hung.

ANONCOJN por estonaj gazetoj kaj ĵurnaloj, disvastigadon de presajoj kaj ofertoj en Rusio prizorgas Esperanto-oficejo Tallinn-Vazalemo, Estonio. Almetu resp.-kup.

GVIDLIBRETO DE ANTWERPEN. Sendu simplan internacian respond-poŝtkarton al s-o Frans Schoofs, del. UEA, 45, Kleine Beersiraat, Antwerpen, Belg., por tuj ricevi belan ilustritan 32-paĝan broŝuron pri la urbo Antwerpen, sidejo de nia VII-a Kongreso (1911).

ELDONISTON por „Bai Ganjo Balkanski“, humora rakontaro de Aleko Konstantinov, okupanta belan 50-60 paĝan broŝuron, serĉas la tradukinto Iv. Krestanoff LK en Pirdop, Bulgario.

ESP. EKSPOZICIO. Fritz Michalek, Reichenberg, Lerchenfeldstr. 20, Ĉeĥoslovakio, kolektas kaj interŝanĝas por konstanta esp. ekspozicio ĉiuspecajn esperantajn, propagandilojn ktp.

„**ESPERANTO**“ de UEA, n-on 182 de okt. 1915, deziras aĉeti s-o Ploussu, del. de UEA, 4 Place J. Achard, Grenoble, Francujo; por ĝi li pagos la montrotan prezon.

LIBRO-AMANTOJ ATENTU! Kiu estas amanto por antikva Luther-biblio, presita en 1585 de Hans Lufft? Prez-proponoj al Marg. Schoske, Breslau, Germ., Schweidn. Stadigraben 1 (65).

TEKSAĴOJ. Samideanoj aĉetas teksaĵojn ĉe Otto Meister en Ronsdorf, Germ. Petu proponojn.

„**BES-a ADRESARO** de Esperantistoj el ĉiuj landoj“, 3-a eldono, kun 1000 adresoj kaj ilustraĵoj, estas ricevebla ĉe la eldonanto „Bohema Esperanto-Servo“, Moravany, Bohemujo, Ĉeĥoslov., por 10.50 gmk. mk. aŭ 7 resp.-kup.

ĈIUN NOVAN ESP. LIBRON kaj aliajn esperantajn sendu kun notita prezo al esp. vendejo „Bohema Esperanto-Servo“, Moravany, Bohemujo, Ĉeĥoslov.

GEJUNULOJ! Manuskripto rondiranta estas fondata. Gejunuloj verkemaj sin turnu, aldonante se eble poŝtm. por respondo, al H. Seppik, Tallinn, Manesi 7-12, Estonio.

Korespondeo kaj Interŝanĝo.

Liverpool (Anglujo), Jas. Jones, 9 Hurry St., deziras korespondadi kun kooperativanoj pri internaciaj kooperativaj aferoj.

F-ino Cialina Montaner, Danús 1-1, Palma de Mallorca, Hispanio, interŝanĝas ilustritajn gazetojn, poŝtkartojn kaj poŝtmarkojn, korespondas esperante, france, angle kaj hispane.

S-o Ad. Houben, Kattenberg 28, Borgerhout, Antwerpen, Belgio, deziras korespondadi per poŝtkartoj ilustr. kaj interŝanĝi poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj.

S-o Br. Kruszczyński, Bydgoszcz, Polonio, ul. Siemiradskiego 20, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj.

Mi sendas por 20 gmk. aŭ 40 malsamaj nedifektitaj poŝtmarkoj 36 poŝtmarkojn de Meza Litovio. — H. Horodniĉi, Wilno, Sw. Anny 7-7.

S-o Wacław Kwiecinski, Wilno, ul. Żelazna-Chatka, dom S. Kiełbowski, Meza Litovio, deziras korespondi per il. poŝtkartoj aŭ leteroj kaj interŝanĝi prefere nestampitajn poŝtmarkojn.

En Decembro aperos n-o 12 de

LITERATURO

Kvaronjara Literatura Gazeto Esperanta.

En tiu numero aperos, inter aliaj interesajoj: 1. Traduko de **La Forpaso de Arturo**, el la verkoj de la fama angla poeto Tennyson. La traduko estas farita de f-ino L. Briggs, kiu per ĝi gajnis oran medalon de la Brita Literatura kaj Debata Societo.

2. Artikolo pri Infana Esperanto, de s-o M. C. Butler, kun multaj interesaj ekzemploj de infana parolado.

Kun ĉiu ekzemplero de la gazeto estos donacata bela portreto de la infanoj preparolataj.

Ne estas necese atendi por aboni. Tion vi povas fari tuj, kaj tiuokaze vi ricevos ankaŭ n-on 11 (per kiu via abono komenciĝos).

Abonprezoj por la sekvantaj landoj nun estas (por kvar kvaronjaraj numeroj):

Belgujo 4 frankoj	Kanado 50 cendoj
Danujo 2.50 kronoj	Meksikio 4 dolaroj
Egiptujo 12 piaŝtroj	Nederlando 1.50 floroj
Franco 4 frankoj	Norvegujo 2.50 kronoj
Grekujo 5 drakmoj	Svedujo 2.50 kronoj
Hispanujo 3.50 pesetoj	Svisujo 3 frankoj
Japanujo 1 jeno	Usono 50 cendoj.

Abonantoj en aliaj landoj devas sendi 2 ŝilingojn kaj 6 pencojn en angla mono aŭ 12 resp.-kup.

Charles H. Edmonds, Wembley, Angl.,

Administranto,

„Rockwood“, High Road.

F-ino Maria Ambrojunas, Tallinn, Postkasto 6, Estonio, deziras korespondi pri teozofismo, okultismo, telepatio, grafologio, ĥiromantio, mitologio, religio, medicino kaj pri amo.

Paul Berg, Öle t. 6, Tallinn, Estonio, deziras korespondi pri mitologio, popolpoezio, historio de literaturo kaj pri historio.

S-o Augusto Birk, Tallinn, Estonio, W. Balesna 5-1, deziras korespondi pri teozofio, okultismo, grafologio, telepatio, ĥiromantio, religio, filozofio kaj pri amo.

S-o Paul Mänd, poŝtoficisto, Estonio, Ambla, Postitän 2, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn (stampitajn), kontraŭ poŝtkartoj ilustritaj por albumo. Li deziras ankaŭ korespondadon kun gesamideanoj el ĉiuj landoj.

S-o Hannes Kūskinen, Finnlando, Wiborg, III/S. I. R. stabo, deziras korespondi per poŝtkartoj ilustr., leteroj, poŝtmarkoj kun ĉiuj landoj (bfl.)

S-o E. Tulkki, Finnlando, Wiipuri, Teallisuuskoulu, interŝanĝas poŝtkartojn kaj leterojn kun ĉiuj landoj.

S-o W. Tulkki, Finnlando, Wiipuri, Salmann pükrikonttori, interŝanĝas poŝtkartojn kaj leterojn kun ĉiuj landoj.

S-o Sulo Koivisto, Finnlando, Wiipuri, Sammankatu 57, interŝanĝas poŝtkartojn kaj leterojn kun ĉiuj landoj.

S-o Ing. Leopold Berger, Moravany, Bohemujo, Ĉeĥoslov., interŝanĝas poŝtmarkojn, poŝtkartojn, esperantajn; kolektas adresojn por sia „BES-a Adresaro“.

Erwin Thun, Grottau, 417, Zittauerstr., Bohemio, deziras korespondi per poŝtkartoj ilustr. (bfl.) kun la tuta mondo kaj interŝanĝi poŝtmarkojn.

S-o Manuel Noelle Güell, General Arenales F. O. P., Argent., Sudameriko, deziras interkorespondadi kun gesamideanoj ĉiulandaj per leteroj aŭ poŝtkartoj ilustr., pri iaj temoj, precipe pri socialista movado; ankaŭ interŝanĝas poŝtmarkojn, gazetojn, revuojn, librojn esperantajn ktp.

Freiberg Sa., Germanujo, 4 sinjoroj deziras korespondi per leteroj kaj poŝtkartoj ilustr. kaj interŝanĝi poŝtmarkojn kun eksterlandanoj. Skribu al: Gerhard Brüner, Herderstr. 4-1.

F-ilo Willy Thiele, komerca direktoro, Zittau, Saksujo, Böhmische Str. 5, deziras korespondi per leteroj, poŝtkartoj ilustr. (bfl.) kun gesamideanoj eksterlandaj.

S-o Rob. Pandikow, Rülstringen, Müllerstr. 55, Germ., deziras korespondadi per poŝtkartoj kaj leteroj kun ĉiuj landoj.

Karl Hermann, Düsseldorf, Germ., Becherstr. 52, deziras korespondi kun ĉiuj landoj per ilustr. poŝtkartoj.

S-o Walter Unruh, inĝeniero, Glashütte-Sa., Germ., deziras korespondadi per poŝtkartoj ilustr. kaj leteroj kun samideanoj en ĉiuj landoj.

Torpedo-Oberm. Fritz Dehne, Zerbstörer „V. 5“, 5. Halbflothille, Wilhelmshaven, Germ., deziras korespondadi per poŝtkartoj ilustr. kaj leteroj kun ĉiuj landoj.

Kiu sendos al mi 50 diversajn poŝtmarkojn stampitajn de sia lando, ricevos same tiom de mia lando. Ankaŭ mi korespondas per poŝtkartoj ilustr. — Kurt Wenzel, Düsseldorf, Germ., Scheurenstr. 49.

S-o Ludwig Schmid, instruisto, deziras korespondadi kun samideanoj ĉiulandaj, precipe kun fraŭlinoj. Adreso: Reinhausen/Regensburg, Bavario, Germ., Waihallastr. 198.

S-o E. Friebel, instruisto, del. de UEA, Residenzstr. 24, Dresden-Dobritz, Germanlando, serĉas tujmondajn gekorespondemulojn per ilustr. poŝtkartoj (bfl.) kaj leteroj pri ĉiu temo, prefere pedagogia; donas komercajn informojn

Korespondadon pri diversaj temoj, interŝanĝon de poŝtkartoj ilustritaj kun ĉiuj landoj (krom Germ.) deziras la Esp. Grupo en Neustadt O. S., Untere Mühlsr. 18, Germanio.

Düsseldorf, Germ., Nordstr. 77, II, Otto Weselmann, deziras interŝanĝi pensojn per il. poŝtkartoj aŭ leteroj; ankaŭ deziras esp. gazetojn.

S-o Fr. Derr, telegr. sekretario, Düsseldorf, Germ., Dusselstr. 65, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun la tuta mondo.